# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

---

LOKA GRUPO DE ĈEA n-ro 4/1987 septembro 1987

Josef Vích

## Kelkaj vortoj pri la 72a UNIVERSALA KONGRESO en Varsovio

La 72a Universala Kongreso en Varsovio estis vere grandioza evento por tutmonda esperantistaro kaj por mi tre forta travivaĵo.

Ĉeestis pli ol 6000 esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Tia granda nombro de partoprenantoj postulis memkompreneble tre bonan preparon kaj organizadon. Kaj ĉio estis ankaŭ vere bone organizita. En la kongresejo estis aranĝitaj diversaj oficejoj tiel videble kaj klare signitaj, ke ĉiu esperantisto, kiu venis unuafoje en la kongresejon, povis sin orienti tre bone. Preparitaj estis jam longaj listoj de ĉiuj partoprenontoj laŭlande kaj ĉiu partoprenonto havis jam sian personan kongresnumeron. Anoncante sian kongresnumeron ĉiu kongresano ricevis memoraĵo – aktujon, sur kiu estis granda orkolora simbolo, honore al la centjariĝo de Esperanto kaj ora surskribo: 72a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, VARSOVIO, 25. 07. - 01. 08. 1987 = En tiu ĉi aktujo estis jam preparitaj ĉiuj necesaj kongresaj dokumentoj, kiel Kongresa libro, Programo de la kongreso kun suplemento, persona insigno de partoprenanto (portante tiun ĉi insignon videble oni havis senpagan trafikon en ĉiuj tramoj kaj busoj en tuta Varsovio) kaj multe da utilaj prospektoj, la Kongresa libro enhavis ĉiujn necesajn infofmojn rilate al la kongreso kaj ĉiuj kongresaj aranĝoj. La Kongresa libro kun Suplemento enhavis ankaŭ laŭnumere kaj laŭlande nomojn kaj precizajn adresojn de ĉiuj (proksimume 6000) partoprenantoj. Do tiuj ĉi du libroj servis kiel gvidlibro tra la Kongreso por ĉiu partoprenanto.

La programo de la Kongreso estis tre, tre riĉa. Jam tri tagojn antaŭ la Solena Inaŭguro estis plenkunsidoj de Komitato de UEA, traktantaj pri interna kaj ekstera agadoj. Vendredon, la 24-an de julio 1987, estis ankaŭ (krom la Komitato de UEA, kiu traktis denove pri interna kaj ekstera agadoj – en la salonoj Hodler kaj Privat) estrarkunsido de Bahaa Esperanto-Ligo, plenkunsido de Komitato de UEA kaj Komitata bankedo.

Sabaton, la 25an de julio, estis krom la membrokunveno de Bahaa Esperanto-Ligo kaj la plenkunsido de Komitato de UEA, granda interkona posttagmezo, dum kiu estis subĉiela koncerto kaj foiro antaŭ la kongresejo. Sur podio, instalita sur la placo antaŭ la kongresejo, aktoris solistoj kaj ensembloj de diversaj landoj. La plej grandan aplaŭdon ricevis kord-cimbala muziko el Moravio kun du kantistoj.

Dimanĉon, la 26-an de julio, estis la Soluna Inaŭguro de la kongreso, kiun ĉeestis ankaŭ membroj de familio Zamenhof, ĉar la plej granda kaj vasta salono de la kongresejo, la salono Ludoviko, posedas "nur" 3000 sidlokojn kaj la membro de partoprenantoj de la Kongreso estis pli ol 6000, la solena inaŭguro devis okazi dufoje. Oni aranĝis Solenan Inaŭguron I por kongresanoj kun kongresnumeroj 1 – 1500 kaj 3001 – 4500 je la 10a horo matene kaj Solenan Inaŭguron II por kongresanoj kun kongresnumeroj 1501 – 3000 kaj 4501 kaj pli je la 14a horo posttagmeze.

Post la inaŭguro komenciĝis jam la granda karuselo de plej diversaj aranĝoj kaj ne estis absolute eble partopreni en ĉiuj. Estis koncertoj en la Parko Lazienki, Internaciaj Stratkoncertoj en Malnova Urbo, Ekumenaj Diservoj en la Preĝejo Sankta Triunuo, diversaj teatraj prezentadoj, prelegoj pri ĉiuj temoj, ekspozicioj, Cseh-seminarioj, diversaj konferencoj, projekciadoj de filmoj el diversaj landoj, koncertoj en kongresejo, konversaciaj rondoj, sed ankaŭ diskotekoj kaj internacia balo ktp.

Tre sukcesa kaj vere rava kaj ĉarmega estis la Kanzon-koncerto de kanada kantistino Joelle Rabu. Ankaŭ dum la Internacia Arta Vespero prezentis sin kelkaj tre bonaj geartistoj kaj ensembloj el diversaj landoj. Post la Solena Fermo de la Kongreso sabaton, la 1-an de aŭgusto, estas ankoraŭ Adiaŭa Folklora Koncerto, dum kiu ludis kun granda sukceso kaj sur alta arta nivelo la Ensemblo de Kanto kaj Danco de la Varsovia Politekniko.

La tuta kongreso okazis en rave amika atmosfero. Estis ligitaj multaj novaj amikecoj kaj ĉiuj bedaŭris, ke tiu tiom bela aranĝo de tutmonda esperantistaro devas jam finiĝi.

Por nia sano. Peparas J. Ondráček

(Daŭrigo)

4) Rondirigo de okuloj.

Rigardu al la nazradiko kaj nun faru intense cirklojn (rondojn) en la dekstra direkto, maldekstra direkto kaj reen. Ripetu 4-foje. La saman ekzercon faru en la kontraŭan direkton.

Varianto de la ekzerco.

La rondirigojn praktiku kun la fermitaj okuloj.

5) Ekzercado de akomodo de la okullenso

Etendu la dekstran brakon antaŭ vin, levu la mandorson kaj ekrigardu la ungon de la meza fingro. Nun la manon malrapide proksimigu al la okulo. Poste malrapide ĝin malproksimigi ĝis la brako estas plene etendita. Dume senĉese observu la mezan fingron. La etenditan brakon turnu en la dekstran ekstreman pozicion kaj plu okul-sekvu la mezan fingron. La brakon turnu reen kaj proksimigu ĝin denove al la okuloj. La samon praktiku per la maldekstra brako. Ĉio estas ripetebla.

6) Ekzercado de akomodo laŭ Hibenjamin.

Antaŭ la okulojn metu montrofingron, proksimume 20 ĝis 30 cm, tiel, ke vi ĝin vidu akre kaj vi ekstaru antaŭ certa objekto je distanco kvinobla aŭ pli.

Nun koncentru la okulojn sur la montrofingron kaj tuj sur la malproksiman objekton. Ĉion faru 10-foje. Poste por 3 ĝis 4 sekundoj fermu la okulojn kaj ripozu. La tutan procedon ripetu 2 aŭ 3-foje.

La ekzercadon faru sufiĉe rapide, sed ankaŭ solide, ĉiam kun finita akomodo, por ke kaj la okulpomo kaj la okullenso alkutimiĝu al tiu ĉi agado, la ekzercadon faru maksimume ofte, eĉ dum promenado.

7) Masaĝo de la okulpomo kaj de la okulnervoj (laŭ Osius).

Fermu la okulojn, pugnigu la manojn kaj la montrofingrojn metu sur la okulpomojn. Ilin frotu 3-foje en la mezo, poste la pugnon ŝovu al la tempio kaj en ĝia kaveto (ĝi estas tre sentema loka) frotu per montrofingra artiko la okulnervojn, ĝis vi eksentos froston en la dorso.

Nun per la sama maniero (per pugnoj) frotu la suban parton de la okulpomoj, poste denove la tempiojn kaj fine ĉion ripetu frotante la supran parton de la okulpomo. Ĉion faru 3-foje. Denove, kun fermitaj okuloj, per la pugnoj frotu la okulojn, sed ilian supran parton sub la okularkoj, kaj sur la tempioj masaĝu la okulnervojn. Mi atentigas, ke per tiu ĉi ekzercado, precipe per la frotado de la tempioj, oni povas forigi iujn kapdolorojn eĉ pli bone ol per medikamentoj.

8) Kuracado per persona magnetismo (vivenergio)

Skuetu iom-tempe ambaŭ manojn. Poste intense frotu unu manplaton je la alia, ĝis ili varmiĝos. El la manplatoj faru pladetojn, kiujn almetu sur la fermitajn okulojn, la fingroj estas super la brovoj; restu tiel ĉirkaŭ 10 sekundojn kaj dume vive imagu; kiel la persona magnetismo eliras el la manplatoj, trairas la okulojn ĝis en la cerbon kaj tiel helpas al vi plibonigi vian vidopovon kaj refreŝigi la cerbon. Intense tion ĉi imagu kaj travivu. La ekzercon ripetu 2 aŭ 3-foje. La forto de via penso influas la fluon de la vivenergio.

(Daŭrigota)

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

La programoj de klubkunvenoj de la Klubo de esperantistoj en Prago
Septembro 1987:

1.9. Ankoraŭ pri la Universala Kongreso en Varsovio
14. 9. Post la ĈEA-kongreso en Olomouc
21. 9. Jen Neruda kaj Esperanto – Patera
28. 9. Trarigardo de la Esperanta gazetaro – Štruncová

Oktobro 1987 :
5.10. La ĉi-jaraj jubileoj – Patera
12.10. Frederic Chopin (lumbildoj) – Patera
19.10. Enoficiga aŭdienco (kurioza epizodo diplomatia) – Mařík
26.10. Trarigardo de la Esperanta gazetaro – Štruncová

Novembro 1987:
2.11. 70 jaroj ekde la Granda Oktobro – Patera

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

La kunvenoj de nia klubo okazas regule ĉiulunde ekde la 18.30 ĝis la 20.00 horo en la Agitcentro sur angulo de stratoj Kodaňská kaj Norská. Venu inter nin!

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Estimataj geamikoj, ni invitas vin elkore al la solena koncerto okaze de la Cent-jariĝo de Esperanto kaj 85-jariĝo de nia klubo. La koncerto, en kiu partoprenos: operkantistoj de la Nacia Teatro en Prago, okazos merkrede la 23-an de septembro je la 19.30 h en la granda salonego de la Centra klubo de lernejoj kaj scienco ROH en Praha 1, Na příkopě 10 (Savarin, 1-a etaĝoj). Venu kun viaj familianoj kaj amikoj. Plenkore invitas la komitato de la Klubo de esperantistoj en Prago.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

En la dua duono de la nuna jubilea jaro gravan vivojubileon atingos niaj karaj gesamideanoj – membroj de nia klubo:

s-ano Karel Zahradník, Praha 1
s-ano František Brandejs, Praha 4
s-anino Anna Fryšová, Praha 10
s-ano D-ro Vlastimil Zázvorka, CSc, Praha 6
s-anino Miroslava Juřenová, Újezd n. Labem
s-ano Vladimír Severa, Praha 2
s-ano Jaromír Vrkoslav, Praha 1
s-anino Marie Mráčková, Praha 3
s-anino Marie Zámostná, Praha 8
s-ano Prof. Ing. Josef Kochman, Praha 5
s-ano Jan Šilhán, Praha-Roztoky
s-anino Marie Šiková, Praha 3
s-ano Ladislav Kobza, Praha 9
s-ano Václav Ševčík, Praha 3
s-anino Věra Jermářová, Praha 10

Al ĉiuj ni deziras ĉion plej bonan, firman sanon kaj bonan humoron.

Komitato de la Klubo
Klubo de esperantistoj Prago

Eli Urbanová

## D u m  s o b r a j  t a g o j

Dum sobraj tagoj, cetere malmultaj,
mi homo estas preskaŭ tutnormala,
ĉar tre simila al edzinoj stultaj:
Mi mastras hejmon per man' radikala.
Sur la pargeto rampas mi serpente,
super lavtrogo festas mi triumfon,
se mi eksidas, do nur pormomente
kaj plej verŝajne mi riparas ŝtrumpon.
El kuirejo ŝvebas cep-odoro;
odoro ege por la naz' agrabla.
Ni manĝas bone, je preciza horo...
Kia mi estas? Preta kaj kapabla!
Eĉ restas tempo por legadi, studi,
per mask' mirakla viŝi trajtojn velkajn,
por korespondi, jes, pianon ludi,
kun najbarino perdi vortojn kelkajn...

Sed tag' ebria! Forgesitaj devoj.
En mi sin nome akumulis premo.
Sur sof' mi kuŝas, dronas mi en revoj...
Kaj la rezulto? Ploro aŭ poemo.

(El "Verso kaj larmo")

Jana Cíchová

## F i n o  d e  l'  s o m e r o

Fulmo pajlosakon ekbruligis
balancanta en la vent'
Timas mi,
ke l' incendi' bruligos ĉion
kio ĝian sferon falas.

Brulas frunto
maltrankvilas kor'
La manplatoj brule palpas
realecon en la song'.

Pro vi la fantazio plejabundas
Je vi odoras mia rob'
Ĉeestas vi en mia taglabor'
kaj eĉ en mia endormig'.

Fine de l' somero
la centfoli' bruliĝis ruĝe,
pikas per dornaro
sindefende
antaŭsente
ŝirrompiĝi de l' arbust'.

(El eldonota poemaro)

Parolado "de D-ro L. Zaleski-Zamenhof dum la Universala Kongreso en Varsovio

Dum la solena inaŭguro de la 72-a UK faris paroladon ankaŭ la nepo de la kreinto de Esperanto, D-ro Ludwik Zaleski-Zamenhof. Ni prezentas ĉi-sube plenan tekston de lia parolado.

Sinjoro Alta Protektanto, Sinjoro Prezidanto,
Gesinjoroj Kongresanoj,

Mi dankas la Kongreson kaj la Estraron de UEA por la afabla invito.

En la nomo de la familio Zamenhof mi salutas la Kongreson... Mi deziras al vi ĉiuj plene sukcesi en viaj grandanimaj taskoj. Tiuj kelkaj vortoj ege kortuŝas min. Mi havis la okazon eldiradi ilin plurfoje, estinte juna knabo. Precize antaŭ kvindek jaroj mi eldiris tiujn vortojn, salutante la Esperanto-Kongreson tie ĉi en Varsovio, en 1937. Mia filino Hanna ripetis ilin en 1959, tiam kvinjara, en la sama loko. Tiu-ĉi-foje mi rediras ilin ankaŭ por ŝi, kaj por mia dua filino, Margareto, fortenita per profesiaj taskoj.

Tamen Esperanto ja ne estas familia afero, kvankam estis tempoj, kiam miaj familianoj estis persekutataj pro Esperanto. Mia patro, Adam, malliberigita en tiu ĉi urbo en oktobro 1939, en sia kvalito de la filo de Doktoro Zamenhof, pereis tri monatojn poste. Mi salutas lian memoron. Mi salutas ankaŭ la memoron de Lidia kaj Sofia, kiuj pereis en Trablinka tri jarojn malpli frue. Tamen, mi akcentu ankoraŭfoje, Esperanto estas afero nek de familio, nek de iu klubo, nek de grupo, nek de nacio, nek de ŝtato, nek de religio. Plue, la Lingvo Internacia ne estas celo por si mem; ĝi devas esti instrumento de la granda, filozofa, homarana koncepto de la kreinto, aŭ iniciatinto de la lingvo, kiel Doktoro Zamenhof preferis nomiĝi. La juna kuracisto, prezentanta antaŭ cent jaroj tiun teknike genian inventon, antaŭvidis en ĝi ilon por kuraci la malsanojn premantajn la tiaman mondon: la maltoleremon, la malamon, la malegalecon inter nacioj aŭ religiaj grupoj, inter homoj de diversaj har- aŭ haŭt-koloroj. La kuracisto-filozofo konsideris, ke la profunda kaŭzo de tiuj simptomoj estis interhoma malkompreno; tial li esperis trovi efikan rimedon, proponante la internacian lingvon: facilan ilon de kemunikado.

La epoko ŝanĝiĝis, la internaciaj kontaktoj evoluis fortege dum la lastaj jardekoj, kelkaj naciaj lingvoj rangaltiĝis, fakte fariĝinte internaciaj komunikiloj interne de grupoj, de ŝtatoj, en politika aŭ en geografia senco. Tamen la iamaj simptomoj de la homara malsano, ĉiam latentaj, vekiĝas de tempo al tempo. Staras ankoraŭ la "muroj de miljaroj", se ne plu inter la popoloj, do inter la regionaj socioj, farantaj la aktualan dividon, anstataŭ kunigon de nia mondo. La "glavo sangon soifanta" ŝajnas minaci ankoraŭ nian terglobon.

Tial la ideo de la interhoma kompreno, ideo de la homarana solidareco tra sociaj, naciaj, regionaj aŭ religiaj diferencoj, ĉiam montrigas aktuala. Ke en la "granda rondo familia", elpensita de mia avo, por inkludi la tutan homaron, ĉiu familiano – ano de la homaro, ĝuante egalecon en liaj (aŭ siaj) hemaj rajtoj, vivu en la paco kaj en frata interkompreno.

Mi salutas la lingvon kaj la ideojn de mia avo. Sukcesan Centjaran Jubileon!

(Kongresa Kuriero)

------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

El parolado de s-ro Nigel Cassar, reprezentanto de gen. sekretario de U.N.:

Mi volas diri, ke estas granda honoro havi tiun okazon renkonti vin, kaj ke mi volas transdoni varmajn bondezirojn de la Ĝenerala Sekretario kaj ankaŭ lian bedaŭron, ke li ne povas mem ĉeesti ĉi tiun Kongreson. Mi krome donas mian varman dankon al la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, profesoro Tonkin, pro lia afabla invito...

Universala Esperanto-Asocio kaj Unuiĝintaj Nacioj ĝuas intimajn rilatojn, ĉar la Asocio estas en la listo de Ne-Registaraj organizaĵoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Kaj la Asocio estas en konsultaj rilatoj kun UNESKO.

Ni ĉiuj rekonas la neceson venki la lingvajn barojn, ne nur kiel celon en si mem, sed ankaŭ kiel ilon por krei tutmondan pacon, prosperon kaj cel-unuecon. Aliflanke ni rekonas ankaŭ la neceson konservi la lingvojn, kiuj estas emblemo de kultura identeco kaj same de nacia suvereneco. (Kongresa Kuriero)

------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

BULTENO de Klubo de Esperantistoj en Praha (loka grupo de ĈEA), p.k. 1069, 111 21 Praha 1. Redaktas; Kultura komisiono ĉe la komitato de la Klubo de Esperantistoj.

V roce 1987 oslaví pražský esperantský klub

100 let esperanta
85 let založení svého klubu

několika akcemi:

23. září v 19.30 hod. Slavnostní koncert ve velkém sále ústředního klubu školství a vědy ROH Praha 1, Na příkopě.10 - Savarin, I. patro. (Garantem této akce je s. Helena. Štruncová, Tádžická 1423/4, Praha 10, PSČ 101 00, tel. 744 676)

16. listopadu v 15 hod. Zasazení pamětní lípy v sadech Naděždy Krupské ve Vršovicích. Tento park je naproti našemu klubu na Kodaňské ulici. (Garantem této akce je s. Ing. Ludvík Veselý, Litvínovská 527/22, Praha 9 - Prosek, PSČ 190 00, tel. 888 781.)

22. listopadu bude uspořádán bleskový šachový turnaj v agitačním středisku "Kodaňská" v Praze 10 - Vršovicích, roh ulic Kodaňská a Norská. Začátek turnaje bude ve 13.30 hodin. Přihlaste se nejpozději do 15. listopadu na adresu: s. Václav Štěpánek, Macurova 16, Praha 4 - Chodov, PSČ 149 00, tel. 792 39 03.

V posledním týdnu listopadu, od 23. do 29. bude uspořádána velká společná soutěžní výstavka fotografií a kreslení v esperantském klubu ve Vejvodově ulici. Tématem této výstavky je oslava 100. výročí esperanta, 85. výročí založení našeho klubu, esperanto v bojí za mír a dorozumění mezi národy. Této soutěže se mohou zúčastnit všichni esperantisté a přátelé esperanta. Soutěž bude anonymní. Nejmenší formát fotografií je 13 x 18 cm, nejlépe na lesklém papíru. Příspěvky posílejte garantům (s plnou adresou a uvedením věku) nejpoždéji do 15. listopadu. Nevyžádané příspěvky nebudeme vracet.
(Garant fotosoutěže: s. Ing. Zbyněk Khail, Václavkova 10, Praha 6, PSC 160 00, tel. zam. 221 503.
Garant soutěže, kreslení: s. Jan Sihelník, Na pláni 13, Praha 5, PSČ 150 00, tel. 538 458.)

Ve druhém týdnu prosince od 7. do 13. bude uspořádána výstavka výtvarné tvořivosti dospělých i mládeže v esperantském, klubu, ve Vejvodově ulici. Do soutěže nám pošlete všechno pěkné, co umíte udělat, pletení, vyšívání, modely, vyřezávání atd., všechno co muži a ženy umí. Soutěž bude anonymní. Všechny věci vám na vyžádání vrátíme. Příspěvky posílejte nejpozději do 30. listopadu garantovi soutěže. (Garantem soutěže je s. Ludmila Křesinová, Litvínovská 523, Praha 9 – Prosek, PSČ 190 00, tel. 888 618.)

Vážení přátelé!

Chceme, abyste se na haše akce přišli nejenom podívat, ale také se jich zúčastnili a přivedli svoje známé. Seznamujte s naším hnutím především neesperantisty.
Těšíme se, že i mimopražské esperantské kluby, kterým toto oznámení posíláme, seznání vhodným způsobem svoje členy a vyzvou je k účasti.

100 let esperanta 100 let esperanta 100 let esperanta 100 let esperanta
85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu 85 let klubu 85 let